Nova Esperanto-Biblioteko

No 1 30 Pf.

# La kulpo de Entente

Konciza resumo kunmetita
:: el oficiala materialo ::

Eldonita de
Deutscher Esperanto-Dienst
(Germana Esperanto-Servo)

Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin S 59

S
Esp

Nova Esperanto-Biblioteko

No 1

# La kulpo de Entente

**Konciza resumo kunmetita**
**:: el oficiala materialo ::**

Eldonita de
**Deutscher Esperanto-Dienst**
(Germana Esperanto-Servo)

**1917**

**Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin S 59**

700.347-A. Esp.
1

## Uzita fontmaterialo

Belgaj dokumentoj = Belgaj dokumentoj 1905—1914. Raportoj de la belgaj reprezentantoj en Berlin, London kaj Paris al la ministro por eksteraj aferoj en Bruxelles. Eldonitaj de la germanimperia oficejo por eksteraj aferoj.

Blanklibro = Germana Blanklibro, eldonita de la germanimperia registaro.

Dokumentoj pri la militeksplodo, eldonitaj de la germanimperia registaro; ili enhavas ankaŭ la unuan eldonon de la Germana Blanklibro. La laŭvorta traduko de ĉi tiuj dokumentoj troviĝas en n-oj 17—24 de Internacia Bulteno, kiuj aparte ankoraŭ estas haveblaj. (Vidu la anoncon sur la lasta paĝo de la kovrilo)

Blulibro = Angla Blulibro, eldonita de la angla registaro.

Flavlibro = Franca Flavlibro, eldonita de la franca registaro.

Oranĝlibro = Rusa Oranĝlibro, eldonita de la rusa registaro.

Ruĝlibro = Aŭstri-hungara Ruĝlibro, eldonita de la aŭstrihungara registaro.

Diversaj libroj kaj gazetartikoloj sufiĉe gravaj.

NATIONALBIBLIOTHEK WIEN ÖSTERR.

# Anglujo

## I. Antaŭ la atenco en Serajevo

### A. Laŭplana encirkliga politiko kontraŭ Germanujo

#### 1. Personaj paŝoj de reĝo Edward VIIa

a) Vizito en Paris en Majo 1903. Tosto je la interproksimiĝo de Francujo kaj Anglujo.

b) Vizito en Paris la 30an de Aprilo 1905. Li aprobas la programon de Delcassé (Entente inter Francujo kaj Anglujo, ekefektivigo de pli bonaj rilatoj de Anglujo al Ruslando).

c) Vizito en Paris la 5an de Marto 1906. Li invitas al si sinjoron Delcassé, kiu pro sia kontraŭgermana sintenado intertempe devis forlasi la direktadon de la ekstera politiko de Francujo. — „Ne plu ekzistas dubo pri tio, ke estis la reĝo de Anglujo, kiu sendepende de sia registaro pelis sinjoron Delcassé en militeman politikon kaj donis al li promesojn, surbordigi 100000 anglajn soldatojn en Holstein. La invito de la reĝo al sinjoro Delcassé dum lia restado en Paris povas esti klarigata nur kiel elvoko. Se ankoraŭ iuj duboj estus ekzistintaj, ili estus forigitaj per la stranga paŝo de kolonelo Barnardiston ĉe generalo Ducarme.“ (El letero de la belga ambasadoro

en Berlin, barono Greindl, al barono Favereau, ministro por eksteraj aferoj, de l' 5a de Aprilo 1906. — Belgaj dokumentoj)

d) Vizito en Paris la 2an de Februaro 1907, en Cartagena la 2an de Aprilo 1907 por aligi la reĝon de Hispanujo, en Gaeta la 18an de Aprilo 1907 por aligi la reĝon de Italujo. Kunveno kun Clémenceau kaj Isvolski en Karlsbad en somero 1907 por allogi Aŭstrio-Hungarujon.

e) Renkonto kun la caro de Ruslando la 9an kaj 10an de Julio 1908 en Reval. Vizito en Ischl la 12an de Aŭgusto 1908 por tenti imperiestron Franz Joseph.

f) Interparolo kun Clémenceau en Paris la 16an de Aprilo, kun la reĝo de Italujo en Bajä la 29an de Aprilo 1909.

### 2. Ŝtatinterkonsentoj de Anglujo direktitaj kontraŭ Germanujo

a) 1904. Kolonia interkonsento kun Francujo de la 8a de Aprilo 1904. (Forigo de ĉiuj konfliktaĵoj, precipe la konsento de Francujo pri la fakta protektorato de Anglujo pri Egiptujo kaj rekono de la privilegiita pozicio de Francujo en Maroko per Anglujo.)

b) 1905. Anglujo promesas al Delcassé la surbordigon de 100000 anglaj soldatoj en Holstein en kazo de milito inter Francujo kaj Germanujo (komparu 1 c).

c) 1906. Interkonsento kun Belgujo. Intertraktoj de la angla militista ataŝeo Barnardiston en Bruxelles kun aprobo de l' ĉefo de la angla generalstabo pro forsendo de angla ekspedicia korpuso al Belgujo por la kazo de germana-franca milito. (Dokumentaro „*Conventions anglo-belges*" — Dokumentoj pri la militeksplodo)

d) Interkonsento kun Francujo en Septembro 1912 pro kunagado sur la maro. (Anglujo surprenas la ŝirmon de la Norda Maro, la Kanalo kaj la Atlantiko, Francujo koncentras sian militŝiparon en la Mediteranea Maro.)

e) Anglujo faras pliajn interkonsentojn kun Belgujo en la jaroj 1912 ĝis 1914.

aa) Precizaj unuopaj esploroj estas faratajn pri la lokaj cirkonstancoj en Belgujo kun helpo de la belgaj estraroj, kaj la akirita materialo estas kunmetata en sekretaj manlibroj. *(Belgium, Road and River Reports prepared by the General Staff, War Office* — Dokumentoj pri la militeksplodo)

bb) Anglujo ricevas plej intimajn sciigojn pri la belga mobilizo kaj la defendo de Antwerpen. En la posedo de la angla ambasador-sekretario Grant-Watson en Bruxelles oni trovis en la jaro 1914 apartenantajn al la ambasadorejo dokumentojn kun plej intimaj sciigoj el la jaroj 1913 kaj 1914 pri la belga mobilizo kaj la defendo de Antwerpen;

inter ili cirkulerordonoj al la altaj belgaj komandejoj kun la faksimilita subskribo de la belga generalstabĉefo, krome protokolo pri kunsido de la „komisiono por la nutrada bazo de Antwerpen“ de la 27a de Majo 1913. (Dokumentoj pri la militeksplodo)

f) Novembro 1912. Kontrakto inter Grey kaj Cambon pri reciproka helpo de Anglujo kaj Francujo en militkazo. Interkonsento de la ambaŭflankaj generalstaboj.

g) Militŝipara interkonsento kun Ruslando de la 26a de Majo 1914.

## B. Kontraŭgermanaj paŝoj de Anglujo

„Kie ajn Anglujo povas fari malfacilaĵojn al Germanujo, ĝi tuj uzas la okazon.“ (El raporto de la belga diplomatia agento en Berlin de la 5a de Aŭgusto 1905)

### 1. Anglujo montras sin malamiko de Germanujo en la Maroko-afero 1905—1906

a) „Dum la lasta tempo la ministro por eksteraj aferoj ripete diris al la diversaj en London legitimitaj ambasadoroj, ke Granda Britio kontraŭe al Francujo rilate Marokon promesis sindevigojn, kiujn ĝi plenumos ĝis ekstremo, eĉ en kazo de germana-franca milito kaj konsidere al ĉiu risko.“ (El raporto de la belga diplomatia agento en London de l' 14a de Januaro 1906)

b) „Videble la angla ambasadoro en Algeciras eĉ ne plej malmulte klopodis, por trovi solvon egale akcepteblan por Germanujo kaj Francujo.“ (El raporto de la belga ambasadoro en Berlin de l' 5a de Aprilo 1906)

**2. Anglujo provas malhelpi la pacon post la anekso al Bosnio kaj Hercegovino**

a) En 1909, kiel rezultas el rimarko de reĝo Karol de Rumanujo al Paul Lindenberg en aŭtuno 1909, Anglujo incitis Serbujon per la parolo: „Vi ne estas solaj, komencu nur.“

b) Anglujo sin montras treege malkontenta pri la paca solvo de la aneksa demando en printempo 1909 kaj eĉ militincitema. Anglujo armadas sin en frapanta maniero. — „Ĉu tio okazas nur por ŝirmi sin kontraŭ atako, kiun Germanujo tute ne povas entrepreni?“ (El raporto de la belga ambasadoro en Berlin de l' 13a de Februaro 1909)

**3. Anglujo same sin montras kiel militincitanto en la Maroko-afero en 1911**

„El nepre fidinda fonto estas sciigite al mi, ke la oficiroj de la aktiva armeo estis revokataj el sia forpermeso, ke okazis aĉetoj de ĉevaloj por la kavalerio kaj ke Nordmara eskadro dumtempe estis metata en militpretecon.“ (El raporto de la belga ambasadoro en London de l' 18a de Novembro 1911)

## C. Kreado de kontraŭgermana atmosfero

1. La belga ambasadoro en London raportis la 7an de Februaro 1905:

„La malamikeco de la angla publiko kontraŭ la germana popolo jam estas sufiĉe malnova. Ĝi bazas, kiel ŝajnas, sur ĵaluzo kaj timo.“ La civila lordo de la admiralitato, A. Lee, dum festeno „laŭdis la enkondukitajn de la angla registaro reformojn, kiuj permesas fari la unuan baton, antaŭ ol la kontraŭulo estos preta, ja eĉ antaŭ ol la milito estos deklarita.“ La gardemo de la admiralitato precipe estu etendata sur la Nordan Maron.

2. La belga ambasadoro en London raportas la 24an de Majo 1907:

„Certa kategorio de la gazetaro, ĉi tie konata sub la nomo, „flava gazetaro“, grandparte estas respondeca pri la malamika animstato inter la du nacioj. Kion oni do povas atendi de ĵurnalisto kiel lordo Northcliffe, kiu en intervjuo por *Le Matin* diras: „Jes, ni abomenas la germanojn kaj tion elkore; ili faras sin malamataj en tuta Eŭropo. Mi ne permesos, ke mia gazeto enpresas eĉ nur la plej malmultan, kio povus ofendi Francujon, sed mi ne deziras, ke ĝi aperigu ion, kio povus esti agrabla por la germanoj.“ . . . Estas klare, ke la oficiala Anglujo kaŝe praktikas malamikan al Germanujo politikon, kiu celas izoladon al Germanujo, kaj ke reĝo Edward ne

malŝatis servigi al tiu ideo sian personan influon; sed certe estas danĝere, veneni la publikan opinion en tiel evidenta maniero, kiel faras tion la ne respondeca gazetaro, pri kiu ĉi tie estas parolate."

3. La 21an de Julio 1911 Lloyd George faras kontraŭgermanan paroladon.
4. Churchill uzas la okazon de la alveno de Haldane en Berlin, la 9an de Februaro 1912, por publike nomi la germanan militŝiparon luksa siparo, t. e. io superflua.
5. La historiisto Cramb en la jaro 1913 faras frapantajn paroladojn pri Germanujo kaj Anglujo. Arda alvoko por armado, por la ĝenerala militserva devo, por la batalo kontraŭ Germanujo!

## D. Incitlaboro de la gazetaro

1. La belga ambasadoro en London raportas la 7an de Februaro 1905:

„La anglaj gazetoj erarigas la publikan opinion, kiu jam estas influita tiom, ke ĝi ne plu aljuĝas al Germanujo la rajton, pliigi siajn marbatalfortojn kaj kiu en ĝia marinobudĝeto vidas elvokon al Anglujo."

La belga ambasadoro en Berlin raportas la 23an de Septembro 1905:

„La gigantaj penadoj de la angla gazetaro, malhelpi pacan finon de la Maroko-afero, kaj la

certe ne sincera facilkredemo, kun kiu ĝi aperigas ĉiujn kalumniojn kontraŭ la germana politiko, pruvas, kiom la publika opinio en Granda Britio estas preta, saluti ĉiun kontraŭgermanan kombinaĵon."

2. En la jaro 1907 antaŭ ĉio estas la Northcliffe-gazetaro, kiu incitas kontraŭ Germanujo (komp. C 2). Ankaŭ la cetera angla gazetaro „daŭrigas sian kalumnian militiron kun pli granda persistego ol iam; laŭbezone ĝi elpensas tutajn historiojn, kiel ekz. la laŭdiran projekton pri fermo de la Baltika Maro." (El raporto de la belga ambasadoro en Berlin de l' 28a de Marto 1907)
3. *The Times* de la 20a de Julio 1911 okaze de la Maroko-intertraktoj energie protestas kontraŭ tio, ke Germanujo ricevos kompensaĵojn.

## II. Post la atenco en Serajevo

### A. Anglujo stariĝas kontraŭ Aŭstrio

Grey la 26an de Julio 1914 proponas la London-an konferencon, ne kiel senpartiulo, sed kiel helpanto de Ruslando. — „Anglujo povas ludi la rolon de peranto en Berlin kaj Wien kun pli bona sukceso, kiel amiko, kiu, se ĝiaj moderigaj proponoj ne estas atentataj, iutage aliformiĝos en konfederiton, ol se ĝi tuj deklaras sin konfederito de Ruslando." (La angla ambasadoro en Petersburg al Grey. — Blulibro, n-o 17)

**B. Anglujo kuraĝigas Ruslandon kaj Francujon al milito, por kiu ĝi promesas sian kunagadon**

1. La 27an de Julio 1914 Grey diras al la rusa ambasadoro, ke la impreso, ke Rusujo restos trankvila, estas forigata ankaŭ per la ordonoj, kiujn li estas doninta al la unua militŝiparo. (Blulibro, n-o 47)
2. La 29an de Julio 1914 Grey tuj informis la francan ambasadoron pri sia sciigo al la germana ambasadoro en London, ke Germanujo devas atenti la partoprenon de Anglujo en la milito, kaj per tio li kuraĝigis Francujon. (Blulibro, n-o 87)
3. La belga ambasadoro en Petersburg skribas al la belga ministro por eksteraj aferoj la 30an de Julio 1914: „Hodiaŭ oni en St. Petersburg estas firme konvinkita pri tio, oni havas eĉ la certecon, ke Anglujo helpos Francujon. Ĉi tiu helpemo estas eksterordinare grava kaj ne malmulte efikis, ekhavigi superecon al la militpartio."

## Francujo

## I. Antaŭ la atenco en Serajevo

**A. Partopreno en la encirkliga politiko de Edward VIIa**

(Vidu sub Anglujo)

## B. Kontraŭgermanaj oficialaj agadoj post la interkonsento de Algeciras

1. Francujo en la sekvinta tempo ĉiamaniere ne lojale interpretas la interkonsenton de Algeciras. La belga ambasadoro en Berlin raportas pri tio la 28an de Marto 1907, ke Francujo promesis respekti la sendependecon de la sultano de Maroko; spite de tio la ministro por eksteraj aferoj diris al la belga ambasadoro en Paris, ke la sultano estas pupo, kiu havas nenion alian por fari, ol plenumi la ordonojn de la diplomataro. Subtenata de la franca registaro societo instalas la senfadenan telegrafion en Maroko, malrespektante la suverenajn rajtojn de la sultano kaj spite de liaj protestoj. Malgraŭ la destinoj de la Algeciras-dokumento, laŭ kiu ekzistas plena samrajteco de ĉiuj, ekster en la fakoj de la polico kaj bankoj, diras Pichon, ke la supera estreco de Francujo ĉie devas esti aŭtoritata. La Algeciras-dokumento garantias la principon de la malferma pordo; sed en Paris oni konsideras ĉiun provon de konkuro kiel baton direktitan kontraŭ Francujo. Malgraŭ la nedifektebleco de Maroko oni okupas la urbon Udŝa kiel garantiaĵon pro la murdo al Dro Mauchamps, sen pruvo por la intenco de la sultano, eltiri sin el siaj sindevigoj. „La franca aroganteco ree fariĝas same granda kiel en la plej malbonaj tagoj de l' dua imperio, kaj *Entente cordiale* estas kulpa pri tio."

2. Pichon en 1909 rifuzas la petpostulon de Germanujo, en la aneksa demando instigi Petersburg-on al pacema sintenado. La belga ambasadoro en Berlin raportas pri tio la 18an de Oktobro 1912: „Ne estis la kulpo de la imperiestra registaro, ke la krizo elvokita per la anekso al Bosnio kaj Hercegovino en la jaro 1909 ne trovis pli bonan solvon. Germanujo estis proponiginta al la Paris-a kabineto, komune procedi en Petersburg, por instigi Ruslandon al ŝanĝo de ĝia sintenado. Nur post kiam sinjoro Pichon estis malakceptinta ĉi tiun komunagadon, la Berlin-a kabineto decidiĝis al la konata paŝo. Mi konsideras utile, restarigi la veron pri tiu historia fakto. Mi aŭdis ĝin antaŭ kelkaj tagoj en la franca ambasadorejo.“
3. Delcassé en 1913 fariĝas ambasadoro en Petersburg.
4. Francujo en Septembro 1913 konsentas al Ruslando miliardan prunton, kies celo estas la konstruado de strategia relvojaro, kiu ebligu ne antaŭviditan ĝis tiam rusan ofensivon kontraŭ Germanujo. Pri tio la malkovro de *Le Temps*: „*Il faut que toutes les parties s'accordent harmonieusement à préparer le succès final.*“ (Estas necese, ke ĉiuj partioj harmonie kuniĝu, por prepari la finan sukceson.)

## C. Ŝovinismo de la gazetaro

1. La belga ambasadoro en Berlin raportas la 9an de Februaro 1907, ke oni devas demandi sin, ĉu

la vidigata ekscito kontraŭ la intencoj de la germana imperiestro estas tute sincera. „Ĉu ne eble estas la daŭrigo de la kalumnia militiro, kiun oni de du jaroj faras en la gazetaroj de Paris, London kaj St. Petersburg, kaj en kiu *Le Temps*, la duonoficiala organo de la franca ministerio por eksteraj aferoj, speciale distingiĝis dum la lastaj semajnoj."

2. La belga ambasadoro en Berlin raportas la 3an de Marto 1911: „La francaj gazetoj ĉiutage trovas kaŭzon, riproĉi ion al Germanujo. Al tio oni kutimiĝis; sed de mallonge ĉi tiu klopodo progresis je intenseco." — La belga ambasadoro en Paris raportas la 4an de Marto 1911, ke la franca gazetaro „faras en ŝovinismo".
3. 1913. Kreskado de la ŝovinismo en Francujo. Epizodo en Nancy. Mistraktado al germanoj post prezentado de la teatraĵo „La ulano". — „En la duono de la Paris-aj teatroj oni nun ludas nacionistajn kaj ŝovinistajn teatraĵojn." (La franca ministro por eksteraj aferoj Pichon al la belga ambasadoro en Paris, la 16an de Aprilo 1913)

## D. Incitparoladoj, incitraportoj kaj incitbroŝuroj

Ekzemploj el multaj:

1. La franca komandanta generalo Baillard en Marto 1907 diras publike, ke la milito inter Francujo kaj Germanujo estas ne evitebla. Li estas pune translokata, sed kun la akcentado, ke la ne kon-

vena parolado neniel estas la ĉefa, des malpli la sola kaŭzo por la aranĝo.

2. La 27an de Januaro 1908 Delcassé faras ĝenerale aplaŭdatan ŝovinistan paroladon.
3. Generalo Lyantey, ĉefreganto en Maroko, diras la 21an de Decembro 1912 interalie: „*La guerre est l'occasion de l'épanouissement des plus hautes vertus humaines.*" . . . „*Le pacifisme est mort.*" (La milito estas la okazo por la ekflorado de la plej altaj homaj virtoj. . . . La pacifismo estas mortinta.)
4. 1912. La franca kapitano Pierre Felix skribas en rekomendata de Paul Bourget verko, ke Germanujo devas abdiki; li rekomendas internacian ekzekuton.
5. La franca militista ataŝeo en Berlin, kolonelo-leŭtenanto Serret, elmontras la viziton de multnombraj Berlinanoj al la monumento de reĝino Luise en „Tiergarten" je la jarcenta jubileo la 10an de Marto 1913 kiel kontraŭfrancan demonstracion.

## II. Post la atenco en Serajevo

### A. Francujo kuraĝigas Serbujon al kontraŭstaro

La 24an de Julio 1914 Berthelot konsilas al la serba ambasadoro, ke Serbujo provu gajni tempon kaj eliĝi el la senpera interrilato kun Aŭstrio-Hungarujo. (Flavlibro, n-o 26)

## B. Francujo sin tenas rifuzanta kontraŭe al ĉiuj provoj de Germanujo, konservi la pacon

1. Berthelot la 27an de Julio 1914 rifuzas transdoni al la gazetaro la pacigeman komunikon diktitan al li de barono von Schön. (Flavlibro, n-o 57)
2. Bienvenu Martin deklaras al barono von Schön la 26an de Julio 1914, ke li ne estas preta, fari premon en Petersburg (Flavlibro, n-ro 58) kiel okazis flanke de la germanimperia kanceliero en Wien.
3. Bienvenu Martin suspektigas la paŝojn kaj intencojn de la germana ambasadoro (Flavlibro, n-oj 61/62), kaj Berthelot deklaras la 26an de Julio 1914 al la rusa diplomatia agento en Paris, Sevastupolo, ke laŭ lia persona opinio la sinsekvaj paŝoj de Schön en Paris celas timigi Francujon kaj efektivigi ĝian intervenon en Petersburg. (Oranĝlibro, n-o 29) Francujo do faris nenion por la konservo de la paco.

## C. Francujo efikas je siaj konfederitoj en ne favora senco

La franca ambasadoro en Petersburg, Paléologue, jam la 24an de Julio 1914 komprenigas al la angla ambasadoro okaze de komuna interparolo kun Sasonov, kiu havis lokon en la franca ambasadorejo, ke Francujo, se fariĝus necese, plenumos ĉiujn devojn rezultantajn el sia interligo kun Ruslando. (Blulibro, n-o 6)

### D. Francujo de post la 25a de Julio 1914 faras pormilitajn preparojn

1. La manovroj de la 14a korpuso plej malfrue la 27an de Julio estas ĉesigataj. (Blanklibro, aldono 9)
2. „La francaj oficiroj ricevis ordonon, la 27an alveni ĉe sia trupoparto. En la sama tago la staciestro de Feignies ricevis la ordonon, pretstarigi ĉiujn disponeblajn fermitajn vagonojn por truptransportoj al Maubeuge.“ *(Communiqué par la Brigade de gendarmerie de Frameries)* Belgujo estas informata pri ĉi tiuj armaranĝoj. (Laŭ dokumentoj trovitaj en posedo de la angla ambasadorsekretario Grant-Watson en Bruxelles. — Dokumentoj pri la militeksplodo)

### E. Francujo komencas la malamikaĵojn per aviadistaj atakoj

Aviadisto provas detrui konstruaĵojn proksime de Wesel, alia ĵetas bombojn sur la fervojojn apud Karlsruhe kaj Nürnberg. (Flavlibro, n-o 147)

## Ruslando

# I. Antaŭ la atenco en Serajevo

### A. Ruslando partoprenas la encirkligan politikon de Edward VIIa

Per la kontrakto kun Anglujo pri Persujo, Tibeto kaj Afganistano de la 31a de Aŭgusto 1907 ĝi

forigas la malhelpaĵojn kontraŭstarantajn al interna interakordiĝo.

## B. Konduto dum la tempo de la bosnia krizo en 1909

Rusaj voĉoj postulas partojn de Bosnio kaj Hercegovino por Serbujo kaj Montenegro. La belga ambasadoro en Berlin raportas la 7an de Novembro 1910, ke en la rusa popolo evoluis malamo kontraŭ ĝia okcidenta najbaro, kiu ankoraŭ estas pliigata per la ĵaluzo elvokita de la rapida evoluo de la germana potenco.

## C. Projekto pri Balkanligo kontraŭ Aŭstrio-Hungarujo

Ĝi estis akcelata jam en 1909 per Isvolski, en 1911 per ambasadoro Tŝarikov en Konstantinoplo kaj poste tute post la Balkan-milito.

## D. Malamika sintenado kontraŭ la centraj ŝtatpotencoj dum la tempo de la Balkan-militoj

1. Ruslando estas la puŝanta forto post la Balkan-ŝtatoj en la forpremegado al Turkujo el Eŭropo.
2. Antaŭ la eksplodo de la Balkan-milito, en aŭtuno 1912, ĝi koncentrigas gravajn trupamasojn ĉe la galicia landlimo, pretekstante provan mobilizon.

3. Ĝi dekretas la mobilizan ordonon de l' 30a de Septembro 1912: „El plej alta loko estas ordonite, ke la anonco de la mobilizo estas ankaŭ la anonco de la milito kontraŭ Germanujo.“ Sekvas ordonoj pri la almarŝo kontraŭ Germanujo. (Norddeutsche Allgemeine Zeitung, 10an de Novembro 1916)
4. La rusa ambasadoro en Belgrad, von Hartwig, incitas Serbujon kontraŭ Aŭstrio-Hungarujo. La belga ambasadoro en Berlin raportas la 4an de Aprilo 1913: „La serba ambasadoro ĉi tie diris antaŭ ne longe, ke lia registaro ne estus procedinta dum ses monatoj, ne atentante la aŭstriajn minacojn, se ĝi ne estus kuraĝigita al tio per sinjoro von Hartwig, diplomato el la skolo de sinjoro Isvolski.“
5. Ĉe la provo, konservi unuecon en la Balkanligo, la caro proklamas per telegramo de l' 26a de Majo 1913 Ruslandon kiel sole validan por la tuta slavaro plej superan instancon.

### E. Favorado de la panslavista movado

1. La „galicia-rusa“ societo sub la gvidado de grafo Bobrinski agitas por anekso al la „rusa Macedonio“ (Galicio).
2. La rusa diplomatio en la eksterlando akcelas la movadon. La belga ambasadoro en Berlin raportas la 24an de Oktobro 1912: „La franca ambasadoro, kiu ŝajne havas specialajn kaŭzojn por tiel paroli, ripete diris al ni, ke la plej granda danĝero

por la konservo de l' eŭropa paco konsistas el la nedisciplineco kaj la persona politiko de la rusaj reprezentantoj en la eksterlando. Preskaŭ ĉiuj ili estas ardantaj panslavistoj, kaj al ili oni grandparte devas surŝarĝi la respondecon pri la nuntempaj okazaĵoj. Sendube ili sekrete incitos sian landon al interveno en la Balkan-konflikto."

3. En la tutslavista Sokol-kongreso en Prag, en printempo 1912, la rusa registaro igas sin oficiale reprezenti.

## F. La panslavista movado ekkaptas ankaŭ moderajn politikistojn

La historiisto P. v. Mitrofanoff skribas la 12an de Aprilo 1914 en artikolo destinita por la „Prusaj Jarlibroj": „La aspirego al sudo estas historia, politika kaj ekonomia neceseco, kaj la fremda ŝtato, kiu kontraŭstaras ĉi tiun aspiregon, estas *eo ipso* malamika ŝtato . . ., fariĝis nun klare al la rusoj: se ĉio restas tiel, kiel estas, la vojo al Konstantinoplo kondukos tra Berlin."

## G. Malamika sintenado kontraŭ la centraj ŝtatpotencoj post la Balkan-militoj

1. En Aŭgusto 1912 Ruslando postulas de Francujo la reenkondukon de la trijara servotempo kaj motivas ĉi tiun postulon per la aludo pri gravaj komplikaĵoj atendotaj en la aŭstria problemo.
2. En Septembro 1913 ĝi interkonsentas kun Francujo miliardan prunton por konstruo de strategia

relvojaro en Polujo, kiu ebligu ĝis tiam ne antaŭviditan ofensivon.

3. En Majo 1914 ĝi faras kun Anglujo militŝiparan interkonsenton direktitan nur kontraŭ Germanujo.

## II. Post la atenco en Serajevo

### A. Serbujo estus estinta preta al cedo, se Ruslando estus konsilinta al tio

Tio rezultas el la jeno:

1. El la telegramo de l' kronprinco Georg de Serbujo al la caro de l' 24a de Julio 1914. (Serbujo volas akcepti *ĉiujn* kondiĉojn, al kies akcepto la caro konsilas.)
2. El la eldiro de reĝo Peter al la itala deputato Casolatta, laŭ kio Serbujo en 1914 estus cedinta al la aŭstri-hungara ultimato, se Ruslando ne estus premeginta al la milito, certigante, ke ĝiaj armeoj ligus la monarĥion.
3. La 25an aŭ 26an de Julio la amerika ambasadoro en Bukareŝti (legitimita ankaŭ en Belgrad), rakontis, ke Pasitŝ deklaris al li, ke Serbujo akceptos la aŭstrian ultimaton, ĉar ne ekzistas alia elturniĝo. Oni estis ĝenerale surprizata, ke tamen la mobilizo de la serba armeo estis ordonata. Oni diris, ke telegramo el *Petersburg* en la nokto de l' 25a de Julio 1914 rekomendis la malakcepton de la aŭstriaj postuloj kaj la mobilizon. (Bukarester Tageblatt, 8. 6. 1916)

## B. Malamika sintenado kontraŭ Aŭstrio-Hungarujo dum la intertraktoj

1. Sasonov en interparolo kun la aŭstria ambasadoro la 24an de Julio 1914 montras nepre malakceptantan sintenadon. (Ruĝlibro, n-o 14)

2. La 24an de Julio 1914 Sasonov dum interparolo kun grafo Pourtalès rifuzas konsenti pri la lokalizo de la aŭstria-serba konflikto kaj direktas plej senmezurajn atakojn kontraŭ Aŭstrio-Hungarujo. (Blanklibro, n-o 4)

3. Jam la 25an de Julio 1914 Sasonov deklaras al la angla ambasadoro, ke, se Ruslando estas certa pri la helpo de Francujo, ĝi ne timos la militon. (Blulibro, n-o 17)

4. El la interparoloj de Sasonov kun Pourtalès rezultas, ke Ruslando eĉ ne kontentiĝus, se Aŭstrio donus la formalan deklaron, nek plimalgrandigi la serban teritorion, nek tuŝi la serban suverenecon, nek difekti rusajn pribalkanajn aŭ ceterajn interesojn. (Ruĝlibro, n-o 55)

5. Spite de la peto de imperiestro Wilhelm, la caro rifuzas ĉesigi la militistajn preparojn.

6. La belga ambasadoro en Petersburg raportas la 30an de Julio 1914: „La rusa registaro dum la lastaj tagoj toleris ĉiujn porserbajn kaj kontraŭaŭstriajn demonstraciojn kaj neniamaniere provis malakceli ilin.“ (Dokumentoj pri la militeksplodo)

## C. Armadaranĝoj de Ruslando

1. La 24an de Julio 1914 la militministro deklaras en la ministra konsiliĝo, ke Ruslando estas militpreta. La direktantaj personoj jam nun estas decidiĝintaj por milito. (El letero de l' adjutanto de rusa grandprinco de l' 25a de Julio. — Dokumentoj pri la militeksplodo)
2. La 25an de Julio 1914 la ministra konsilantaro sub prezido de la caro diskutas pri la mobilizo de 13, eventuale kontraŭ Aŭstrio agontaj armekorpusoj. Sasonov ricevas la rajton, fari la mobilizon efektiva. (Flavlibro, n-o 50)
3. La 25an de Julio 1914 la trupekzercadoj en la tendaro de Krasnoe estas ĉesigataj, la regimentoj tuj revenas en sian garnizonon, la militlernantoj jam la 25an, anstataŭ en aŭtuno, estas promociataj al oficiroj. (Blanklibro, n-o 6)
4. Laŭ plej alta ordono, kiun Rennenkampf, kiel komandanto de la militista distrikto de Vilna, transdonas al la fortikaĵo, Kovno estas metata en militstaton. (Nordd. Allg. Ztg., 7. 12. 1916)
5. La 29an de Julio 1914 la caro telegrafas al imperiestro Wilhelm, ke li antaŭvidas, ke li tre baldaŭ ne plu povos kontraŭstari la „premon faratan al li“ kaj estos devigata, fari disponojn, kiuj kondukos al milito.
6. La 30an de Julio 1914 cara ukazo vokas la rezervanojn el 23 tutaj gubernioj kaj el partoj

de 18 aliaj gubernioj kune kun la forpermesitaj kozakoj el diversaj regionoj al la standardoj. La presita ordono pri mobilizo en tiu tago jam estis afiŝita al ĉiuj stratanguloj en Tomsk. (Raporto de la germana imperiestra konsulo en Tomsk)

7. La rusa ĝenerala mobilizo estis ordonata en la nokto inter la 30a kaj 31a de Julio 1914, kvankam la lasta propono de Grey (okupo al Belgrad per la aŭstrianoj, poste plua intertraktado) estis akceptita en Berlin kaj Wien. (Blulibro, n-oj 88 kaj 135; Ruĝlibro, n-o 51)

## Serbujo

De post 1909 Serbujo daŭre montras malamikan sintenadon kontraŭ Aŭstrio-Hungarujo.

### I. Dum la tempo de la anekso al Bosnio kaj Hercegovino

#### A. Ĝi protestas kontraŭ la anekso

#### B. En la Skuptŝina 66 deputatoj parolas por milito kontraŭ Aŭstrio-Hungarujo

La ministro por eksteraj aferoj Milovanoviĉ faras protestvojaĝon al la ŝtatpotencoj, kronprinco Georg kun Pasitŝ vojaĝas al Petersburg.

### C. Malamikemaj paroladoj estas farataj en la Skuptŝina

1e de Stojan Protiĉ: „Inter ni kaj Aŭstrio-Hungarujo paco kaj bona najbareco povas ekzisti nur, se Aŭstrio-Hungarujo rezignas esti granda ŝtatpotenco kaj se ĝi decidiĝas akcepti la rolon de orienta Svislando";

2e de la ministro por eksteraj aferoj Milovanoviĉ: Aŭstrio-Hungarujo devas ĉesi esti Balkan-ŝtato.

## II. Post la 31a de Marto 1909

**(do post rekono de la anekso kaj promeso, konservi amike-najbarajn interrilatojn)**

### A. Serbujo principe ne atentas aŭstriajn plendojn en la unua Balkan-milito

„La aroganteco kaj la malestimo, kun kiuj la serboj akceptas la plendojn de la kabineto en Wien, estas kompreneblaj nur per la helpo, kiun ili opinias trovi en St. Petersburg." (El raporto de la belga ambasadoro en Berlin de l' 4a de Aprilo 1913)

### B. Serbujo aspiras, kontraŭ la interesoj de Aŭstrio, eliron al la Adriatika Maro

### C. La serba registaro toleras la kriman agitadon

de diversaj, kontraŭ la monarĥio direktitaj unuiĝoj (Narodna-Odbrana, Sokol-unuiĝo, Dusan Silni), la

senbridan lingvon de la gazetaro, la gloradon al iniciatoroj de atencoj, la partoprenon de oficiroj kaj oficistoj en kaŝintrigoj, ne bonan propagandon en la publika instruado, ĉiujn manifestaciojn, kiuj la serban popolon povis instigi al malamo kontraŭ la monarĥio kaj al malestimo de ĝiaj institucioj. La registaro permesas, ke en la militministerio en Belgrad antaŭ la akceptĉambrego estas pendigata bildo, kiu simboligas la ŝovinistajn, kontraŭ la ekzistado de la aŭstri-hungara monarĥio direktitajn celadojn de Serbujo. (Ruĝlibro, n-oj 7 kaj 19)

## III. En la atencafero de Serajevo

### A. Serbaj oficiroj kaj oficistoj partoprenis la preparojn por la murdo

1. La projekto estas elpensita en Belgrad kun helpo de majoro Voja Tankkosiĉ, kiu partoprenis ankaŭ en la havigo de armiloj.
2. La bomboj devenis el la armildepoto de la serba armeo en Kragujevaĉ.
3. La serbaj lim- kaj dogangardistaroj favoris la transiron de la krimuloj trans la landlimojn de Bosnio-Hercegovino kaj la enkontrabandadon de armiloj. (Ruĝlibro, n-o 7)

### B. Serbujo montras maldelikatan karakteron kontraŭe al la murdo

1. Ĝojo, sarkasmo kaj moko en Niŝ en la tago de la atenco. (Ruĝlibro, n-o 5)

2. Serbaj gazetoj en ĉiutagaj artikoloj priparolas la senpotencon kaj la disfalon de Aŭstrio-Hungarujo kaj insultas ĝin sen timo pro puno al siaj organoj kaj eĉ ne haltas antaŭ la persono de l' imperiestro Franz Joseph. (Ruĝlibro, n-o 6)
3. La serba oficiala gazeto *Srpski Novine* kiel aldonon aperigas je la 28a de Junio 1914 incitantan alvokon de Narodna Odbrana. (Aldono 4 de la memorando pri la serbaj okazintaĵoj — Ruĝlibro, n-o 19)

## C. Serbujo ne donas al Aŭstrio-Hungarujo la ŝuldatan kontentigon

1. Ambasador-konsilanto von Storck la 30an de Junio ricevas de la ĉefsekretario de la serba ministerio por eksteraj aferoj la deklaron, ke „la serba polico tute ne okupis sin pri la atenco." (Ruĝlibro, n-o 2)
2. La serba respondnoto akceptas nur la postulon 8 de Aŭstrio-Hungarujo (malhelpo de la kontrabandado de armiloj kaj eksplodiga materialo), dum la aliaj postuloj parte estas tute malakceptataj, parte tre grave aliigataj aŭ akceptataj nur kun gravaj rezervoj. (Ruĝlibro, n-o 34)

# Aldono

## La kulpo pri la eksplodo de la milito

*De kolonelo-leŭtenanto Buddeke*

Kiu senpartie ekzamenas la okazintaĵojn, kiuj antaŭ tri jaroj kondukis al la militeksplodo, kaj la sintenadon de la partoprenantaj ĉe tio sep ŝtatojn, konsiderante ilian politikan sintenadon antaŭ kaj dum la milito, tiu devas veni rilate la demandon pri kulpo al la sekvanta rezulto:

**Serbujo** estas respondeca pri la politika murdo en Serajevo kaj per tio ankaŭ pri la kaŭzo por la militaj komplikaĵoj. Ekprenante la batalilojn kaj alvokante la helpon de Ruslando, anstataŭ doni al Aŭstrio-Hungarujo sufiĉan kontentigon, ĝi krome estas kulpa pri la pliakriĝo kaj disvastiĝo de la konflikto. Ĝia aroganta kaj ne cedema konduto igas ekkoni, ke en Ruslando de komenco ĝi vidis sian helpanton kaj ke ĝi opiniis veninta la horon por la realigo de siaj grandserbaj aspiroj.

Ankaŭ la potenculoj de **Ruslando** vidis en la aŭstria-serba konflikto la bonvenan okazon por la dezirita milito, kiu alportu al ili la realiĝon de iliaj panslavistaj revoj kaj la akiron de la estreco sur la Balkano kaj ĉe la Baltika Maro. Jam priorie dediciĝintaj por la milito, ili nek estis akceptemaj por perantaj proponoj, nek speciale klopodis havigi al si la ŝajnon de rajto aŭ kaŝi la militeman intencon.

Ili sciis, ke ili nur bezonis daŭrigi la jam de longe komencitajn armadojn, por devigi la centrajn ŝtatpotencojn al kontraŭaranĝoj kaj tiri kun si la Entente-kunulojn. La konduto de Ruslando estis mallerta, bruta, fanfaronanta pri la graveco de la amaso, pura perfortago! Ruslando estis la murrompilo de Entente, la senpera inicianto de la mondmilito.

En la insida konduto de **Francujo** esprimiĝas la silenta kontentiĝo pri tio, ke ĝi vidis veninta la deziregitan horon de l' revenĝo, kaj tion sub aparte favoraj kondiĉoj, ĉar la rusa konfederito staris en la unua vico kaj ke sekve en la atendota batalo oni povis esti tute certa pri li. Tute ne intencante, fari eĉ nur la plej malmultan por eviti la milit-eksplodon, ĝi pli vere per sia „*laisser aller*“ efikis incitante al Ruslando kaj maltrankviligante al la centraj ŝtatpotencoj. Per sia senkondiĉa konsento pri la ne akceptebla por la centraj ŝtatpotencoj propono pri konferenco kaj per sia elturniĝa respondo al la germana demando pri neŭtraleco ĝi montris sian decidiĝon pri milito. Per siaj tro fruaj milit-armadoj kaj limdifektoj ĝi ŝarĝis sur sin ankaŭ senperan kulpon pri la eksplodo de l' milito.

La tro frua interveno de **Anglujo** kun pera propono igas ekkoni ĝian grandan intereson pri la konflikto kaj samtempe la deziron, ludi en ĉi tiu afero la rolon de la *spiritus rector*, kiun en la Entente ĝi estis preninta sur sin de post la komenco de sia encirkliga politiko. La anglaj potenculoj sciis, ke nun estis donita disputkazo, kies decido povis pli-

proksimigi ilin al iliaj celoj, direktitaj al la subpremo de Germanujo, ĉu ĝi konduku al diplomatia humiligo al la centraj ŝtatpotencoj, ĉu al milito sub plej favoraj kondiĉoj. Iliaj peraj proponoj pro tio celis nur, paralizi la militistajn aranĝojn de Aŭstrio-Hungarujo kontraŭ Serbujo, dum oni ne faris iun manmovon, por instigi Ruslandon al ĉesigo de ĝiaj armadoj; pli vere oni persistigis Ruslandon per sekreta certigo pri helpo. La anglaj peraj proponoj do estas takseblaj nur kiel diplomatiaj ŝajnmanovroj, kiuj, se la centraj ŝtatpotencoj ne cedis, donu tempon al la Entente-kunuloj por militarmadoj. En la franca-belga demando montras sin la sama tromp-ludo. Kvankam Germanujo proponis ĉiujn garantiojn por indulgo al Francujo kaj Belgujo, Anglujo rifuzis la promeson pri neŭtraleco, kaj dum ĝi mem per siaj antaŭaj intertraktoj kun Belgujo estis ŝancelinta la neŭtralecon de ĉi tiu ŝtato, ĝi postulis de Germanujo la plej severan respekton de la belga neŭtraleco. Ĉi tio estis la lerta tempotiro en la diplomatia ŝakludo, per kiu Anglujo antaŭ la mondo provis malpravigi Germanujon kaj al si mem havigi kredeblan militkaŭzon. La sintenado de Anglujo estis hipokrita kaj insida. Ĝi estis la puŝanta forto de Entente kaj tiel fariĝis la *pera* inicianto de l' mondmilito.

**Belgujo** montris per sia malafabla rifuzo al Germanujo kaj per sia alvoko al la angla helpo, ke ĝi staris sur la flanko de Entente. Per siaj antaŭaj sekretaj konspiraĵoj kun la Entente-ŝtatpotencoj, sed

ankoraŭ pli per tio, ke ĝi — kiel estas konstatite per eldiroj de militkaptitoj — jam antaŭ la germana demando pri eventuala tramarŝo malfermis la landlimojn al francaj trupoj, ĝi mem forlasis sian neŭtralecon kaj perdis la rajton pri ties respektateco.

**Aŭstrio-Hungarujo** konsidere al la konservado de sia aŭtoritato kaj de sia ŝtata sekureco ne povis akcepti la murdon al sia tronheredonto per individuoj pagitaj de Serbujo, ne postulante kontentigon por tio. Ĝi estis nepre rajtigita al militista procedo kontraŭ Serbujo, kiam ĉi tiu ne nur rifuzis sufiĉan rebonigon, sed ekprenis la batalilojn kaj alvokis la rusan helpon. En la helpo de Ruslando al Serbujo kaj ankaŭ en la tre unuflankaj peraj proponoj de Anglujo ĝi devis vidi difekton al siaj rajtoj; tamen, konsiderante la dezirojn de sia samligano, ĝi ĝis la lasta horo estis preta, intertrakti kun Ruslando kaj en tio iris ĝis la ekstremo de cedemo. Sekve Aŭstrio-Hungarujon ne trafas kulpo pri la milito.

**Germanujo** ne volis la militon. Por tio ne ekzistas pli frapanta pruvo ol ĝia sintenado ĉe la militeksplodo. Ĝia tuta celado de komenco estis tia, lokalizi la ekestintan konflikton kaj forteni la danĝeron de ĝenerala milito. Sekve ĝi perceptis sian ligan devon al Aŭstrio-Hungarujo tute laŭ la senco de perado inter Wien kaj Petersburg, kaj eĉ la lastan anglan proponon, post la enmarŝo en Belgrad ĝisatendi la peran agadon de la ŝtatpotencoj, ĝi apogis per la plej forta intenseco, kiun la amikeca interrilato permesis. Kontraŭe al Ruslando la

germana registaro montris grandajn konsideron kaj paciencon. Imperiestro Wilhelm estas la sola ŝtatestro, kiu vere enmetis sin por konservo de la paco. Certe nur malofte monarĥo trovis pli varmajn kaj pli insistajn vortojn, por konservi la konkordon inter du popoloj, ol la germana imperiestro en siaj telegramoj al la caro. La sama honesta klopodo sin montras kontraŭe al Francujo kaj Anglujo. Tiel ne agas registaro, kiu volas la militon. Nur kiam la armadoj en oriento kaj okcidento ekstreme endanĝerigis la propran ŝtaton, ankaŭ Germanujo ekprenis la glavon. Ĉiaj militodeklaroj devenis el la sindefendo, kaj la kulpo pri tio refalas sur tiujn, kiuj devigis Germanujon al tio. La sintenado de Germanujo superstaras ĉian dubon, ĝi koincidas tute kun ĝia en la antaŭaj jaroj pruvita pacamo kaj kun la deklaritaj de ĝi militceloj, kiuj pretendas nur la sekurigon de ĝia stato, dum tiuj de ĝiaj kontraŭuloj malkaŝas la konkervolon, kiu estis la bazo de iliaj ligoj kaj ankaŭ la subkaŭzo de ilia sintenado ĉe la militeksplodo.

Por la nuna momento ilia malica kalumniado helpata de senmezura propagando estu sukcesinta, antaŭ la mondo renversi rajton kaj maljustaĵon; antaŭ la tribunalo de la historio la senkulpeco de Germanujo pruviĝos! [D. K. 110]

Albanus-sche Buchdruckerei, Dresden-A. 1

T. UEA R-dam 1978

# Germana Esperanto-Servo

Perado kaj akcelado de german-internaciaj rilatoj
Germana privera informado

---

G. E. S. aperigas la ĉiumonatan ilustritan gazeton

## Internacia Bulteno

Germana informilo pri la milito

Abonprezo: 4.— M por tuta, 2.— M por duona jarkolekto

---

Kiel apartaj broŝuroj kaj aldonoj ĝis nun aperis:

**La origino de la mondmilito** de Dro Helfferich . . . . . . . . . . . (elĉerpita)

**La venonta milito** de Delaisi . . . . . . . . . 0.55 M

**Memorando pri la traktado al la germanaj konsuloj en Rusujo kaj pri la detruo al la germana ambasadorejo en Petrograd** . . . 0.25 M

**La mensoga militiro per bildoj** (bildfolio) . 0.25 M

**Albumo pri germanaj militkaptitejoj** . . . 0.90 M

**La finbatalo,** Dokumentaro pri la ne limigita U-boata milito . . . . . . . . . . . . . . . 0.50 M

**Pilorio,** Raportaro pri la traktado al germanaj vunditoj kaj militkaptitoj en la landoj de Entente . 0.85 M

**La kulpo de Entente** (Nova Esperanto-Biblioteko, No 1) . . . . . . . . . . . . . . . . . 0.30 M

Krome estas haveblaj:

**Dokumentoj pri la militeksplodo** (Blanklibro de la germanimperia registaro) — Internacia Bulteno n-oj 17—24 . . . . . . . . . . . . . . . . 1.60 M

(La montritaj prezoj entenas la sendkostojn)

---

Oni mendu ĉe la eldonejo

**Friedrich Ellersiek, Wißmannstraße 46, Berlin S 59**


Albanus-sche Buchdruckerei, Dresden-A. 1